

PRI LA SANKTA KOMUNIO

Karaj en Jesuo Kristo kaj la Virgulino Maria, enkonduke permesu al mi citi unu raporton el Vatikana Radio: „Prefekto de Kongregacio por Dia Kulto kaj Sakramentoj kardinalo Antonio Cañizares deklaris, ke estas rekomendinde, por ke la kredantoj akceptu la sanktan Komunion surgenue kaj sur la langon. La prefekto diris, ke tio estas konforme kun senco de la sankta Komunio, kio estas adorado, do esprimo de agnosko de Dio. Akcepto de la sankta Komunio surgenue kaj sur la langon estas „esprimo de adorado, kiun oni devas rekomenci. Se okazas akceptado de la sankta Komunio starante, estas necese antaŭe ekkgenui aŭ profunde adorkliniĝi, kio ne estas praktikata.“ La prefekto de la vatikana Kongregacio por Dia Kulto aldonis, ke „se oni trivialigas la sanktan Komunion, per tio triviliĝas ĉio. Ni ne rajtas perdi atenton pri tiel grava momento, kiu estas la sankta Komunio, do esprimo de agnosko de la reala ĉeesto de Kristo.“

Tiun ĉi raporton mi jam legis antaŭtempe en eksterlanda interreto, sed kiam ĝi aperis ankaŭ en la ĉeĥa lingvo kaj pere de Vatikana Radio, kio estas la eklezia komunikilo sur la plej alta nivelo, etas necese al tiu ĉi komunikilo dediĉi atenton. Kiam al ni rekomendas la sanktan Komunion akceptadi surgenue kaj sur la langon mem la kardinalo prefekto de la Kongregacio por Dia Kulto kaj Sakramentoj, signifas tio, ke al ni tiel komuniĝadi ordonas la plej alta aŭtoritatulo por liturgio tuj post la papo. La Eklezio de Kristo estas en Romo direktata fare de la papo kaj la sanktecaj Kongregacioj, ekzemple per la Kongregacio por Dia Kulto kaj Sakramentoj, Kongregacio por Kredinstruo, Kongregacio por Episkopoj, Kongregacio por Ordenanoj, Kongregacio por Katolika Edukado ktp. Frunte de ĉiu Kongregacio staras kardinalo prefekto, kiu estas kvazaŭ ministro, sed ne por unu ŝtato, sed por la tuta mondo. Se ni volas estis tutmonda katolika

Eklezio, ni devas nin laŭ vortoj de la kardinalo prefekto aranĝi, eĉ se iu al ni dirus ion alian. Ni ĉiuj devas respekti kaj obei la plej altan aŭtoritaton de la Eklezio, estu ni laikulo aŭ episkopo. En nia kazo ankoraŭ ne temas pri la ordono, sed nur pri „rekomendo“, sed tio en tre grava afero, kia estas la Plejsankta Sakramento.

Kvar jarojn antaŭe, ol por nia teritorio estis permesita meto de la Korpo de Kristo sur la manon, okazis al mi, kiam mi mescelebris, ke ĉe la sankta Komunio unu viro etendis la manon. Mi retiriĝis do kaj la viro detiris la manon. Denove mi volis al li doni Hostion kaj li denove etendis la manon. Kelkfoje ni tiamaniere nin transtiris, ĝis li ekscitiĝita sin ĵetis al ciborio de diakono, kiu staris apud mi, kaj mem li priservis sin. Post la sankta meso li venis en sakristion min insulti, ke li estas pastro, loĝanta eksterlande, kaj ke li plendos pri mi ĉe episkopara konferenco. Mi respondis al li, ke tion li trankvile povas, ĉar ĉe ni la disdonado de la sankta Komunio sur la manon ne estas permesita, kaj eĉ se ĝi estus, tiun ĉi permeson mi ne eluzadus.

La sacerdoto celebranta la sanktan meson, konstante responsas pri disdonado de la Korpo de la Sinjoro kaj dependas de lia konscienco, kiun manieron li uzos. Tio, ke la komunianto etandas la manon, tute ne signifas, ke li devas ricevi la sankta Hostion sur la manon. La fingroj de la sacerdoto estas sanktigataj per speciala ceremonio ĝuste tial, ke ili povu tuŝi la Korpon de la Sinjoro, kaj antaŭ la transsubstanciĝo kaj post la sankta Komunio li lavas siajn fingrojn. En nuntempaj superregantaj kondiĉoj estas laŭregula disdonanto de la Eŭkaristio sacerdoto aŭ diakono kaj kromordinara akolito, nomumita fare de episkopo. Aliajn tiel nomatajn servistojn de la Eŭkaristio estas permesite eluzi nur en tute la plej gravaj okazoj, ekzemple kiam dum la sankta meso al la sankta Komunio alvenos kvin mil kredantoj kaj por disdo-

nado de la sankta Komunio ne ĉeestas plua pastro, diakono aŭ akolito. Aŭ se en vasta paroĥo mortas ekzemple pro epidemio de ĥolero multaj homoj kaj nek la pastro nek la diakono aŭ akolito kapablus doni al ĉiuj Viatikon, aŭ ĉe mortminacanta natulkatastrofo aŭ ĉe persekutado de la kristanoj aŭ la milita konflikto. Sed tiaj okazos sur nia teritorio ne ekzistas, kaj do preskaŭ ĉiam tiucele sufiĉas pastroj, diakonoj kaj akolitoj.

Akcepton sur la manon en novtempo enkondukis en la 16-a jarcento protestantoj, kiuj neadis realan ĉeeston de Kristo en Eŭkaristio kaj ja eĉ ili nuligis la sacerdota konsekron. En la katolika Eklezio estis komencita akceptado de la sankta Komunio sur la manon en sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento unue en Nederlando eĉ spite de admono donita fare de la papo al tiama nederlanda kardinalo Alfrink kaj poste ĝi disvastiĝis ankaŭ en Belgio, Germanio kaj Francio. Kiam minacis skismo, la papo en la jaro 1969 permesis donadi sur la manon por tiuj landoj, kie ĝi konflikte al la eklezia disciplino jam disvastiĝis. Tiamaniere estis permesita disdonado sur la manon ankaŭ en nia lando. Ekde la jaro 1990 ĝin iuj pastroj kaj episkopoj konflikte kun la obeemo komencis praktikadi, ĝis en la jaro 1997 la episkopara konferenco postulis la Sanktan Seĝon kaj printempe de la jaro 1998 estis al la kredantoj la akceptado de la sankta Komunio sur la manon ebligita.

Ŝirmantoj de la disdonado de la Komunio sur la manon revokas sin al diversaj praktikaj kaŭzoj kaj ofte ili argumentas, ke tiel oni komuniis en unuatempa Eklezio. Dume ili sin apogas je falsajoj aŭ ili mem falsas la eklezian historion.

Ne estas eble rekonstrui eksterajn detalaĵojn de la Lasta Vespermanĝo aŭ en niaj preĝejoj praktikadi hebrean laŭritan vespermanĝon, kiu la unua sankta meso ne estis.

Sed en la evangelio laŭ sankta Johano ni legas: „Jesuo prenis peceton, trempis ĝin kaj

donis al Judaso.“

Certe Li ne metis la trempitan peceton sur la manon, sed rekte en la buŝon. Kiam la gastiganto donis al la gastoj zorgeme preparitan manĝopecon rekte en la buŝon, tio estis gesto de eksterordinara ĝentileco, aŭ estimo kaj la amo. Ĉe la sankta Komunio estas Dia Gastiganto mem Jesuo Kristo, kiu nin pere de la sacerdota manoj amplene vivtenas per sia Korpo kaj donas al ni valoregan Panpecon en la buŝon.

Ankaŭ en Malnova Testamento estas mencio, kiel anĝelo donas al profeto Jeĥezkelo manĝopecon, nome fasketon kun Dia Vorto, en la buŝon. Tio, kiel la Hebreoj esprimis estimon al la skribita Dia Vorto, ankaŭ validas en novtestamenta Eklezio pri la estimo al la enkorpiginta Dia Vorto, al Jesuo Kristo en la Plejsankta Sakramento.

En unuatempa Eklezio, en periodo de apostola tradicio, la pastro enmetadis Korpon de la Sinjoro en la buŝon, kiel dokumentas Tridentina Koncilio. Sed kiam baldaŭ eksplodis sanga persekutado de la Eklezio, kiu kun paŭzoj daŭris ĝis dua duono de la kvara jarcento ĝis regado de imperiestro Juliano Apostato, dum endanĝerigo de la vivo la kristanoj laŭkomence alportadis Eŭkaristion al bezonantoj, kaŝtenis Ĝin en siaj loĝejoj kaj mem ili la Korpon de la Sinjoro al si donadis. El tiu ĉi eksterordinara situacio evoluiĝis la kutimo en la sankta meso meti la Korpon de la Sinjoro sur la manplaton de la komuniiganto.

Daŭris preskaŭ kvar sekvaj jarcentoj, ol tiu ĉi malkorektaĵo estis tute eliminata.

La komuniigado sur la manon kaj starante, eĉ se ĝi okazus honorinde, ne estas natura esprimo de la dia kredo kaj adorado, kun kiuj estas necese al la sankta Komunio aliradi.

En Usono mi iam estis komisiita, ke mi mescelebru por junaj rusaj katolikoj, kiuj venis tien por partopreni la mondan renkontiĝon kun la papo el ĵus disfalita Sovetunio.

Kaj mi estis tre kortuŝita kaj kuraĝigita en la kredo, kiam la tuta junulara grupo akceptis la Korpon de la Sinjoro kun granda estimo kaj surgenue.

Mem la Sankta Patro nin instruas, kiel kompreni kaj klarigi certajn dokumentojn pri Eŭkaristio, kiam li jam kvar jarojn donas la Korpon de la Sinjoro al genuiĝantoj sur genubenko kaj en la buŝon, kaj tion eĉ en la landoj, en kiuj kutime preskaŭ ĉiuj eluzas „rajton“ komuniĝadi per la mano. Sed la sakramentoj estas donacoj de Dia amo, ne la homa rajto. Tial ne estis kaj ne estas ĝuste batali por komuniĝado sur la manon, kiel oni batalas por diversaj homrajtoj.

Por Vatikano jam pli ol unu jaron validas absoluta malpermeso de disdonado de la Komunio sur la manon.

Ĉeĥa Respubliko estas eble la 32-a aŭ la 35-a lando de la mondo, kie la disdonado de la Komunio sur la manon estis permesita, sed ĉiu dioceza episkopo tion povas por sia diocezo malpermesi. Krome kio estas nur permesita, tion oni eĉ ne povas rekomendi, des malpli ordoni aŭ de malsupre trudpeti.

Ĝenerale dirite, la vera kaj demaskita kaŭzo por disdonado de la Eŭkaristio sur la manon estas la fakto, ke la Sinjoro Jesuo en la Plejsankta Sakramento estas la centra mistero de nia kredo, tial ĝi estas la ĉefa celo

de la atakoj de la malbona spirito. Li ofte misuzadas nian nesciecon, aŭ malgrandan kredon, aŭ sopiron pri novaĵoj, aŭ falsa mistikismo.

Kristo diras: „Se vi ne manĝos la karnon de la Filo de homo kaj ne trinkos lian santon, vi ne havos eternan vivon.“ Kaj iuj el disĉiploj de Kristo protestis: „Malfacila estas tiu parolo, kiu povas Lin aŭskulti?“ Kaj ili ne plu akompanis Lin. Por iuj, precipe la junaj, kelkiam la vorto pri la sankta Komunio eĉ kradeto kaj sur la langon povas soni kiel malfacila parolo. Kaj ne estas mirinde. Jam dekjaron ni vivas en medio, en kiu estas altigita la homo kun propra opinio kaj akcento je emocia travivado, kaj estas malgrandigata senso pri la sankteco, egale ĉu temas pri sanktigataj kaj al Dio konsekritaj personoj, sanktigataj objektoj, ejoj, sanktecaj tempoj, sakralaj muziko kaj arto ĝenerale kaj precipe pri la Plejsankta Eŭkaristio.

La mistero de la Eŭkaristio iam dividis kristanojn kaj en la nuna tempo ĝi dividas eĉ mem la katolikojn. Simeono antaŭdiris al la Virgulino Maria, ke ŝia Filo estos signo, kiun oni rezistos. Kaj al tiuj, al kiuj esprimoj de dia kulto rilate al la Sinjoro Jesuo ne estas indiferentaj, estas destinite kun la Virgulino Maria havi trapikitan koron kaj oferi sian doloron por la savo sia kaj de la mondo. ■

Sac. Filip M. Ant. Stajner, 01.03.2012